



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo



Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 39/1974 18 nov 1974  
Aperas ĉiusemajna

Mendu la koloran glumarkon pri la  
60a Universala Kongreso Kopenhago 75  
1 folio = -,60 DM + -,30 DM aŭfranko!

Kio valoras pli?

Unuhora diskuto aŭ unuminuta monkollekto?

Frankfurto (pp) La Esperanto-grupo Frankfurto estis la gastiganta societo por la jarĉefkunveno de Rhein-Main-Ligo Esperantista (ROMOLO), dimanĉe, la 17 nov 1974. Kvankam la oportuna, digna salono kaj la bela vetero estis bona ekstera kadro por bona interesa kunveno, tiu jarĉefkunveno certe ne donis impulsojn kaj instigojn al la pli ol 40 personoj.

S-ro Gernot Ritterspach, grupestro de Frankfurt, en siaj salutvortoj memorigis pri la 70a datreveno de la fondiĝo de la grupo Frankfurto, kiun la grupo povis festi ĉi-jare. Ĉu tiu okazo ne estus estinta temo por interesa, entuziasmiga aranĝo?

Dum pli ol 4 horoj oni traktis nur organizajn aferojn: novelektojn kaj du proponojn, pri financa subvencio al la informgrupo Darmstadt kaj pri librovendado en librovendejoj.

Sendube Ligo, kiu mem ne havas grandajn enspezojn, ne povas doni multe da financa subvencio al aktiva laborgrupo. Fine post pli ol unuhora diskutado oni trovis en unu punkto kompromison. La alian punkton solvis kolektado per la ĉapelo inter la ĉeestantoj, kiu rezultigis la sumon de 152,17 GM.

Propono skriba de membrino traktis la Esperanto-libromerkaton. Multaj esperantistoj ne estas kontentaj pri la fakto, ke oni ne povas aĉeti kutime Esperanto-librojn en ordinaraj librovendejoj. Sed ĉu tiun problemon oni povas solvi kadre de Esperanto-kunveno? La Esperanto-libromerkato estas - same kiel librovendado entute - ekonomia problemo, kiun ne povas solvi bonintenca, sed tute ne realeca propono.

Post 21 jaroj da prezidanteco Bernhard Zenker, Hanau, definitive retiriĝis el tiu funkcio. Lia posteulo fariĝis Robert Kvasnak, Offenbach. La aliaj funkciuloj estas: vicprezidanto, s-ro Winter, Offenbach; sekretario s-ino Elisabeth Ritterspach; kasisto, s-ro Hentschel, Frankfurto.

Unuanime la kunveno elektis la antaŭan, multjaran prezidanton, Bernhard Zenker, honora prezidanto. Opinie pri tiu honoro s-ro Zenker iomete skeptike: Ĉu tio ne signifas, ke post du jaroj mi denove estos prezidanto?

Je la fino de la kunveno Wilhelm Barnickel, Frankfurto, montris du mem faritajn filmojn: unu pri la ĉi-jara IFEF-kongreso en Tarragona kaj alian, ne tute kompletan, pri marvojaĝo per pramŝipoj en la Mediteraneo.

Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, denove ekspoziciis Esperanto-librojn. Estas nur bedaŭrinde, ke la aranĝantoj de kunvenoj ne lasas sufiĉe da tempo al la partoprenantoj por pli intense rigardi la librojn. Por multaj partoprenantoj de Esperanto-kunvenoj librostando estas interesa kaj instrua programero, kiu prezentas la kulturajn valorojn de Esperanto.

### Estrarkunsido de GEA

Lüdenscheidt (pp) La estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kunsidos en Lüdenscheidt, la 23 kaj 24 nov 1974.

### Kunlaboro sur Esperanta kampo inter GDR kaj GFR?

Berlino/Nurnbergo (pp) La prestiĝa eldonejo Enzyklopädie, Leipzig, en Germana Demokratia Respubliko (GDR), publikigis dum la lastaj kvin jaroj du vortarojn (Esperanta/Germana kaj Germana/Esperanta) kaj lernolibron. Laŭ nia scio tiuj lerniloj estas jam elĉerpitaj ĉe la eldonejo.

Sed estas preskaŭ preta en la manuskripto granda vortaro Deutsch-Esperanto kun ĉ. 30 000 vortoj. La prilaboranto de tiu vortarego estas d-ro E. D. Krause, profesia filologo kaj leksikologo. Sed la eldonejo Enzyklopädie, Leipzig, ankoraŭ hezitas ĉu eldoni tian grandan vortaron por Esperanto, timante, ke ne estus sufiĉe da aĉetantoj.

Libroservo Ludwig Pickel startis rapidenketon inter esperantoparlantoj en FRG, Svislando kaj Aŭstrio por esplori ĉu la supre citita vortaro estos vendebla en ĉi tiuj tri okcidentaj landoj. Ne estas dubo, ke estas bezono en Germanlingvio por tia ampleksa, moderna vortaro. Sed dependas de la esperantistoj ĉu ili estos pretaj aĉeti tian vortaron, kiu certe ne estos malmultekosta. Aliflanke en okcidentaj landoj ne estas eldonejo, kiu estos preta investi monon por Esperanto-vortaro.

Por germanlingvaj legantoj de Pilo-Press estas aldonita al ĉi tiu numero enketilo. Ili estas petataj tuj respondi al la demando, ĉu ili interesiĝas pri la vortaro.

Estus certe salutinde, se per kunlaboro de esperantistoj en FRG kaj GDR la eldonado de tiu vortaro realiĝus!

\*\*\*\*\*

### Nuda inter lupoj - elĉerpita

Berlino (GDR). Centra Laborrondo Esperanto en GDR informas:

"Okazis la sufiĉe malofta aŭ post la milito eĉe unika fenomeno en la internacia esperantista libromarkato, ke libro kun sufiĉe alta eldonkvanto (8000 ekzempleroj) kaj kun meza prezo (12 M GDR, 12 Gld. k.t.p.) post nur ok monatoj (marto - novembro 1974) ĉe la eldonejo elĉerpigis. Kaj tio okazis, kvankam nur malmultaj gazetoj ĝis tiam recenzis la romanon (ekz. "Heroldo" recenzis, "Pola Esperantisto" reprenis partojn).

Tiu ĉi fakto montras, ke intensiva propagando kaj bone preparita internacia amasa mendado de furora libro certigas sukceson neaten-ditan eĉ de plej spertaj esperantistaj eldonspecialistoj. Sole 5000 - 6000 estis venditaj en Soveta Unio, Pollando kaj GDR. La eldonejo "Edition Leipzig" post tiu granda sukceso konsideras eventuale aperigi alian germanan romanon en la Esperanta traduko."

Noto de Pilo-Press: La romano ankoraŭ estas havebla ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, prezo 12,- DM.

### Kalendaro el Koreio

Seoul (pp) Korea Esperanto-Societo eldonas Esperanto-kalendaron 1975 kun 6 bildoj pri tradicia pentraĵo, formato 33 x 88 cm, prezo 1,50 dolaroj + 1 dolaro por aerpoŝto. Oni povas pagi al GIM Taekeng, Seoul, poŝtĝirkonto 1327, aŭ al Libroservo Pickel.

### Esperanto en granda junulara gazeto

Vieno (pp/aem) Aŭstria Esperanto-Movado sukcesis lanĉi dupaĝan ilustritan artikolon pri Esperanto sub la kolumno "Völkerverständigung" (popola interkompreniĝo) en la 20paĝa germanlingva junulara gazeto "Die Wende", kiu estas la plej granda semajna gazeto por junaj plenkreskuloj en Aŭstrio. (Eldono de 20 okt 74)

La artikolo sub la titolo "Esperanto Weltsprache für Minderheit?" (Esperanto mondolingvo por minoritato?) estas tre pozitiva. Krom fotoj pri Zamenhof kaj internacia esperantista grupo elstaras la fotoj kaj eldiroj de 6 junaj esperantistoj el Aŭstrio: Ili estas D-ro Johannes Passini, bankoficisto; Walter J. Woschitz, studento; f-ino Christine Schobert; d-ro Peter Peltzer, universitata asistento; Anna Marbier, oficistino; Heinz Kovacic, studento.

### Esperanto-Eldonaĵoj en Pollando

Varsovio (pp) El unu el la lastaj elsendoj de Pola Radio pri "Esperanto-eldonaĵoj de 'Wiedza Powszechna'" verkita de redaktorino Alina Wójcik, la estrino de la Redakcio de Lernolibroj de la eldonejo "Wiedza Powszechna" ni citas:

"La Esperanto-movado havas longan kaj belan tradicion, kaj en la lastaj jaroj la interesiĝo pri tiu ĉi lingvo treege kreskis. Pli grandigi la nombro de la lernantoj en diversaj kursoj de tiu ĉi lingvo, kaj multaj personoj lernas aŭtodidakte.

Nia eldo-nejto "Wiedza Powszechna", en siaj planoj ĉirkaŭprenantaj ĉiuspecajn helpilojn por la lernado de fremdaj lingvoj - konsideras ankaŭ lernolibrojn kaj vortarojn, kiuj celas helpi en la lernado de Esperanto.

La verdkolora kovrilo de la kompleto konsistanta el lernolibro kaj diskoj titolita "Ĉu vi parolas Esperante?" prilaborita de Andrzej Pettyn rapide formalaperas el librovendejoj. Ne estas mirige. Ĝi estas moderna lernolibro, kies tekstoj, baziĝantaj sur la realaĵoj de la ĉiutaga vivo, enhavas zorgeme selektitan kaj metodike gradigitan materialon gramatikan, klarigitan per koncizaj komentoj.

.....

Por personoj, kiuj ne konas Esperanton aktive, sed deziras partopreni en internaciaj esperantistaj aranĝoj, "Wiedza Powszechna" eldonis "Rozmówki esperanckie" (Konversacian frazaron por turistoj) de Andrzej Pettyn....

Alia laŭvice interesa publikaĵo estas aktuale prilaborata de nia aŭtoro, Andrzej Pettyn. Nia eldonejo aperigos ĝin en la komenco de la 1977a jaro. Temas pri nova lernolibro.....

Aktuale daŭras preparoj por la eldono de la dua, nova, plibonigita kaj kompletigita eldono de ambaŭ Esperanto-vortaroj: de la "Malgranda pola-esperanta vortaro" de Kazimierz Tymniński kaj de la "Esperanta-pola vortaro" de Tadeusz Michalski.....

Tiom por hodiaŭ pri la kurantaj eldon-planoj koncerne Esperanto-librojn de la eldonejo "Wiedza Powszechna", kiu - valoras ĉi tion substreki - de jaroj specialigas pri lernolibroj, vortaroj kaj alispecaj helpiloj por la lernado, respektive instruado de fremdaj lingvoj, kaj inter ili - kompreneble - troviĝas ankaŭ Esperanto.

Estas aldoninde, ke la reeldonita disko-kurso "Ĉu vi parolas Esperante?" jam estas uzata en 25 landoj tutspecale pro la modela prononcado registrita sur la diskoj kaj specimenoj de ĉiutagaj konversacioj. Ĝi estas mendebla ĉe: "Ars Polona", Varsovio, Krakowskie Przedmieście 7, Pollando." La kurso haveblas ankaŭ ĉe Ludwig Pickel, Nürnberg, prezo 46 GM.

**Legu**

**Abonu**

**Donacu**

la revuon por lernantoj, gejunuloj kaj komencantoj

## **Juna Amiko**

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

Eldonita de Hungara Esperanto- Asocio

Haveblas jam la 3 numeroj de la 1a jarkolekto

Prezo 3,- GM

Abonu jam nun la 2-an jarkolekton, kies 1-a numero aperos en septembro 1974

Abonprezo 3,- GM

Distribuanto por okcidentaj landoj:

Ludwig Pickel, Libroservo

Postfach 2113, D-85 Nürnberg 1, FRG

Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851

### Intertempe aperis numero 1 de jarkolekto 2

Abonantoj de Juna Amiko, kiu ricevis jarkolekton 1 kaj deziras ricevi la 2an jarkolekton, estas petataj pagi la abonkotizon de 3,-GM al Ludwig Pickel, Nürnberg, Pk. Nürnberg 819 56-851

\*\*\*\*\*

### Esperanto en la radio

#### Pri la aŭdebleco de Radio Romo

"Mi ĉiam provas kapti viajn programojn, sed malbone sukcesas. Sajne via potenco estas nesufiĉa, aŭ vi devus uzi alian ondon neĝenatan de alia dissendo", skribis el Upminster, Britujo, antaŭ kelka tempo al Radio Romo s-ro J. Brownlee.

Radio Romo en sia lasta leterkesto respondis jene: "Efektive, ambaŭ hipotezoj faritaj de sinjoro Brownlee estas pravaj. Radio Roma ne havas grandan potencon (ankaŭ ĉar la instalaĵoj, iam en kamparo, troviĝas nun meze de dense loĝata kvartalo, plena de ferbetonaj konstruaĵoj, kiuj multe sorbas la signalon jam ĉe la naskiĝo). Delonge oni planas konstrui novan elsendocentron, verŝajne en alia itala regiono, aŭ plipotenci la jam ekzistantan stacion Caltani Setta, sed ĝis nun la revoj frapis kontraŭ la reala nesufiĉo de financoj.

Por la momento, oni povis nur ŝanĝi la ondlongojn, kun la espero, ke la aŭdebleco pliboniĝos, kaj ke aliaj stacioj - senintence aŭ laŭcele - ne ĝenos nian elsendon per sia pligranda potenco aŭ pli targa situo. Ni multe ŝatus ricevi ĝisdatajn informojn pri la aŭdebleco de nia programo en la novaj kondiĉoj."

Skribu al Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00 100 Roma, Italio aŭ al D-ro Antonio De Salvo, C.P. 4017, I-00100 Roma Appio.